

# Internacia Fervojisto

Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF)  
revuo pri fervojo



ISSN 1397-4270

## 2020.3

La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn



**Parkitaj trajnkompletoj en Israelo  
dum koronavirusa epidemio**

## Enhavo:

Anstataŭ salutvortoj por la 72-a IFK .....	43
Kongresoj en tempo de koronaviruso .....	44
Jarraporto de la sekretario pri la jaro 2019 .....	46
Antaŭ, dum kaj post pandemio de <i>Covid-19</i> .....	50
Kiamaniere eŭropaj fervojoj reagas al koronaviruso.....	54
Romantiko de etŝpura fervoja linio en montaro.....	57
Karen K. Olsen, 29.11.1929 – 26.03.2020.....	61
Fritz Lautenbach, 05.03.1925-12.02.2020 .....	62
Aktualaĵoj.....	64
Amuza anguleto .....	64

Titolpaĝo: Stacio *Beersheba*, Israelo. WikiMedia, Moshe Biton

### **Internacia Fervojisto**

Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)

Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro

Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

### **Estraro de IFEF**

**Prezidantino:** Rodica Todor (Rumanio) rodica\_todor@yahoo.com

**Sekretario:** Vito Tornillo (Italio) vitorni@virgilio.it

**Kasisto:** Laurent Vignaud (Francio) laurent@ifef.net

**Redaktoro:** Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko) kovar.lad@email.cz

**Gvidanto de la Faka Komisiono:** Jan Niemann (Danio) niemann@kabelmail.dk

### **Membroj de la Redaktora Komisiono**

Lene Niemann (Danio), Guido Brandenburg (Germanio), István Gulyás (Hungario), Zlatko Hinšt (Kroatio), Laurent Vignaud (Francio)

### **Membroj de la Faka Komisiono**

Guido Brandenburg (Germanio)

Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko)

### **Bank-Konto:**

**Nomo:** „Laurent Vignaud”

**IBAN:** FR33 20041 0 1011 0929 374Y 03237

**BIC:** PSSTFRPPNTE

**UEA-konto:** iffk-o

**Retejo:** www.ifef.net

**Facebook:** <https://www.facebook.com/pages/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372>

## Anstataŭ salutvortoj por la 72-a IFK

Bedaŭrinde ni ĉiuj trapasas unu el la plej malfacilaj periodoj en la moderna historio, kun provokoj kiujn ni apenaŭ povis imagi antaŭ kelkaj monatoj. La koronavirusa eksplodo faras viktimojn tutmonde. La nombro de homoj perdantaj la batalon kontraŭ ĉi tiu viruso estas grandega. La pandemio *COVID-19* ne havas limojn... nek inter landoj, nek inter komunumoj, religioj aŭ homoj. Iu ajn povas infektigi, sed iuj el ni estas pli vundeblaj ol aliaj.



Kiuj ajn estis la planoj, projektoj, revoj kaj deziroj de multaj el ni, ili estis renversitaj, prokrastitaj nedefinite aŭ eĉ haltigitaj.

En ĉi tiu kunteksto, multaj naciaj kaj internaciaj esperantistaj kunvenoj estis prokrastitaj aŭ eĉ nuligitaj. Same okazas pri nia nunjara kongreso, kiu bedaŭrinde estas prokrastita ĝis 2021.

Mi dankas la kolegojn el Germanio kaj Pollando kiuj esperis ĝis la lasta momento ke ni renkontiĝos ĉi-jare en *Frankfurt(Oder)* kaj *Stubice*. Ili prepariĝis por oferti esceptan semajnon dum kiu pluraj esperantistaj organizaĵoj kuniĝis por certigi al ni varian programon, riĉan kaj interesan el ĉiuj vidpunktoj. Mi dankas ankaŭ kolegojn el Ĉeĥio kaj Belgio, kiuj siavice konsentis prokrasti unu jaron la jam planitajn kongresojn en siaj landoj.

Pro tio miaj salutvortoj estas adresitaj nun ne nur al la kongresaj aliĝintoj sed al ĉiuj fervojistaj esperantistoj.

Kvankam izolitaj, mi ŝatus ke vi travivu ĉi tiun izoliĝon ne kiel limigon, sed kiel okazon esti eĉ pli proksima anime de ĉiuj aliaj kiuj konsistigas la grandan esperantistan familion.

Estas vere... koronaviruso ekzistas, plu ekzistos longan tempon, kaj tute ne estas amikema. Samtempe ĉi tiu viruso kreas la perfektan okazon por montri ke ni scias esti respondecaj pri niaj vivoj kaj pri ĉiuj aliaj ĉirkaŭ ni. Estas bona okazo pasigi kvalitan tempon kun ni mem, remalkovri nin eĉ en ĉi tiu malfavora kunteksto, kuraĝigi kaj nutri nian optimismon, sed ankaŭ aktivigi la altruismon, resti kunigitaj kaj prizorgi unu la alian. Kaj precipe esti solidaraj!

Ni, la fervojistaj esperantistoj, fieras pri nia devizo: "La reloj ligas la

landojn, Esperanto la popolojn".

En la lastaj tagoj mi eksciis pri multaj ekzemploj de fervoja solidareco:

- hispanaj grandrapidaj trajnoj nun estas uzataj ankaŭ kiel sanitariaj trajnoj por transporti pacientojn;

- Francio transformis TGV-vagonojn por porti infektitajn homojn al hospitaloj kie ankoraŭ restas liberaj lokoj;

- rumana fervoja entrepreno anoncis la projekton de la Rumana Solidareca Trajno, mobilizante la fervojan transporton por la kompanioj kiuj fabrikas medicinajn materialojn kaj aparatojn.

Mi estas konvinkita, ke ekzistas multaj aliaj ekzemploj de tia solidareco.

Finfine venos la tempo kiam la pandemio finiĝos. Espereble kiel eble plej baldaŭ.

Sed nun mia mesaĝo estas: ni estu respondecaj, ni sekvu strikte la indikojn transdonitajn de la aŭtoritatoj kaj tiel kontribuu, ĉiu el ni, al solvo de ĉi tiu problemo kiu povus draste influi la normalan vojon de nia vivo. Dum ni estas hejme, kuracistaro faras grandegajn klopodojn por kuraci kaj savi ĉiun vivon. Ni helpu ilin!

Kvankam izolitaj, ni restu kune!

Mi deziras al vi ĉiuj sanon, kuraĝon kaj sukceson en batalo diversflanka kontraŭ la epidemio, esperante revidi vin kiel eble plej baldaŭ en Esperanto-renkontiĝoj tutmonde!

**Psik. Rodica TODOR, Prezidantino de IFEF**

## Kongresoj en tempo de koronaviruso

### Transponta Kongreso (72-a IFK) ŝovita al 2021

La mondo turniĝas en granda kirlo. La viruso kraĉas sur ĉies planojn, renversas ĉiujn prioritatojn, forĝas novajn aliancojn kaj disrompas aliajn.

Konsternas la samtempeco de la informoj esperigaj pri unuaj sukcesoj de kontraŭinfektaj strategioj kaj katastrofaj pri

kreskanta nombro de mortviktimoj. Konsternas la perspektivŝanĝo internen fokusanta al la propra kontinento, ŝtato, urbo, strato, loĝejo.



Konsternas la rapideco kun kiu malaperas atingoj de libereco kaj facileco en internaciaj najbaraj rilatoj kaj reaperas antaŭjuĝoj kaj antipatioj.

La izolaj reguloj tegas kiel melduo la ĉiutagon. Ne iri engrupe, teni distancon, eviti ne nepre necesajn aĉetojn, rezigni pri teama sporto, pri vizitoj en muzeo, teatro, kinejo, pri vizitoj ĉe gepatroj, geavoj.

La reguloj celas malhelpi rapidan disvastiĝon de la viruso troŝarĝantan la kuracajn sistemojn. Ni komprenas la logikon kaj klopodas konduki konvene. Sed tiu daŭra membrido kaj tiu daŭra bezono kontroli, kio ankoraŭ funkcias kiel antaŭ la viruso kaj kio ne plu, estas pli streĉa de tago al tago. Ni ĉiuj esperas pri reiro al normaleco, sed scias nur ke tio venos – iam – poste.

Sed nun? Pensi pri kongreso estas kiel rememori oran pasintecon. La kontraŭvirusan strategion – en najbaraj landoj ne sama sed simila - ĝis nun karakterizis regulado de sociaj kontaktoj en pluraj ŝtupoj de strikteco, el kiuj la malrekomendo respektive malpermeso de aranĝoj estis unu el la unuaj kaj kaze de sukceso supozeble estos la lasta.

Neniu kapablas kaj neniu ankaŭ volas diri kiel longe devos daŭri tiu stato. Sed jam hodiaŭ – mi skribas tiun ĉi tekston la 5-an de Aprilo – estas videble, ke la obstakloj en turisma vojaĝtrafiko kaj en limtransiro malebligas la kongreson en tiu loko kaj en tiu tempo.

La kongreso estis ambicia projekto de tri asocioj planintaj kune aranĝi siajn ĉiujarajn asembleojn kun abunda kultura kaj turisma programo.

La decido komuna ankaŭ kun la invitata IFEF pasigi senkongresan jaron 2020 kaj ŝovi la tutan aranĝon al Pentekosto 2021 por ĉiuj estas unika, por ne diri „historia“. Ŝovi ĝin je unu jaro sed konservi la lokon ebligante konservi la koncepton kaj evitu ke la laboro jam farita de ĉiuj helpantoj kaj kunagantoj estos vana.

### **La novaj datoj de la 72-a Internacia Fervojista Kongreso estos la 21-a ĝis la 28-a de Majo 2021.**

GEFA kiel organizanta asocio kontaktis ĉiujn aliĝintojn por informi ilin pri la situacio kaj demandi ilin ĉu ilia aliĝo restu valida kaj por memori pri nuligo de la trajn- kaj flugbiletoj kaj la hotelmendoj. La kondiĉoj de lando al lando estas diversaj. Ni esperas, ke sub la renkontitaj kondiĉoj tio eblas senpage.

Sed precipe ni esperas ke la minaco pasu preter niaj fermitaj pordoj. Ni

konscias ke ni – vojaĝemaj, societemaj kaj majoritate en supra aĝotrieno apartenas al la homoj de tria vivaĝo kun la plej alta risko.

**Guido Brandenburg**

---

## JARRAPORTO DE LA SEKRETARIO PRI LA JARO 2019

### Antaŭrimarkigo

La ordo de la raporto estas kiel tiu de la lastaj jaroj por faciligi komparojn. Pli detalajn informojn pri diversspecaj agadoj oni trovas en la lasta "Resuma jarraporto de la landaj asocioj".

### 1. Membrostato

La aktuala membrostato de IFEF estas: **267** laŭ la pagitaj kotizoj (el kiuj 14 IM), **871** laŭ la sumo de la membroj de la unuopaj LAj. La landaj asocioj estas **13**.

### 2. Interna laboro

#### 2.1. Estrarkunvenoj

La estraro kunvenis dufoje: la 08-an de Majo 2019 fine de la 71-a IFK en Malago (ES), de la 21-a ĝis 24-a de Septembro 2019 en Poznano (PL). Ne oficiale kaj sen tagordo ĝi kunvenis la 26-an de Februaro 2019 en *Pardubice* (CZ) dum faka seminario ĉe la Transportfakultato de la Universitato *Pardubice*.

La temoj de la kunvenoj jam estis traktataj detale en la protokoloj.

En la *Pardubica* kunveno ĉefe estis traktata la organizado de la kongreso en Malago, laŭ raporteto de LKK pri ĝia situacio kaj novaĵoj. Konfirmoj venis pri la elekto de la estraro, ĉefe pri la posteno de redaktoro post demisio de Guido Brandenburg.

Dum la kongreso en Malago, en Majo 2019, okazis kiel kutime, laŭstatute, la publika plenkunsido, malfermita al ĉiuj kongresanoj. Okazis elekto de la IFEF-estraro por la sekva trijara periodo. Decidoj kaj raportoj aperis en nia bulteno IF 2019.4.

La estraro kunvenis en Poznano kadre de ARKONES-aranĝo, sed ne nur pro tio. Fakte la elekto de kunsidloko ne estis hazarda. Ĝin influis kelkaj kaŭzoj. La ĉefa estis planita akcepto ĉe dekano en Politeknika Instituto Poznano, vizito en sidejo de Federacio de Sciencaj kaj Teknikaj Asocioj (NOT). Dum ARKONES-aranĝo renkontiĝis membroj de la LKK por la Transponta kongreso. Alia estis fervoja foiro TRAKO en Dancigo kaj laste ankaŭ kunveno de FISAIC-estraro en *Stargard*, kiun partoprenis Jan

Niemann kaj post ties fino alkroĉis sin al jam kuranta kunsido.

Dum la estrar-kunsido oni traktis diversajn organizajn temojn: situacio de la organizado de la kongreso en *Frankfurt(O)/Stubice*, laŭ la informoj de LKK- membroj, organizaj kaj financaj aferoj, agado interne de IFEF kaj eksteraj rilatoj.

## 2.2. Ĉefkomitatano

Li plenumis akurate siajn multflankajn taskojn; i.a. li disendis cirkuleron kun la demandilo pri la landaj jarraportoj por la jara resumo. Kune kun la Ks kaj la Rd li daŭre ĝisdatigis la adresaron de la IFEF-funkciuloj. Kune kun la Sk kaj la Ks li prizorgis la kolektadon de la demandiloj kaj instigis la malfruiĝintojn respondi. Li atentigis la komitatanojn sendi en ĝusta tempo la petojn pri statutŝanĝoj kaj la eventualajn kongresproponojn. Li krome petis landajn asociojn anonci datojn de siaj jarkunvenoj aŭ konferencoj okazantaj en la jaro por plani kalendaron de IFEF-aranĝoj, por ke ne okazu samtempe du aranĝoj, precipe en najbaraj aŭ pli proksimaj landoj.

## 2.3. Vizitoj

Printempa estrar-kunsido ne okazis, tamen ĈFEA organizis seminarion kune kun la Transporta Fakultato Jan Perner de la Universitato Pardubice pri „Eŭropaj Fervojoj”. Delegacio de IFEF sekvis la inviton kaj prezentis serion de fakaj prelegoj al ĉ. tridek ĉeestantoj, inter kiuj 8 studentoj de la Universitato. La estraro povis viziti la miniaturan trakreton de la fakultato kaj observi plurajn generaciojn de ĉeĥaj regejaj sistemoj en funkcio. Je tiu okazo la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio kaj la Transporta Fakultato de la Universitato Pardubice subskribis kontrakton de kunlaboro inter la du organizoj. La subskribo estis farita de D-ro Libor Švadlenka, la dekanano de la transporta fakultato kaj la IFEF Pr-ino Rodica Todor, Jaroslav Matuška pere de ĈFEA klopodis pri ĝia sukceso.

## 2.4. Situacio kaj estonto de IFEF en kelkaj landoj

La situacio en la landaj asocioj de IFEF ŝanĝiĝis, bedaŭrinde ne plu estas asocio en Japanio. En Belgio pluraj interesitoj fondis BAFE, Belga Amikaro de Fervojistoj Esperantistoj. Ankaŭ en Ĉinio estas kelkaj problemoj, en 2018 ne pagis kotizojn kaj dum 2019 ili promesis pagi, sed ĝis nun ne faris. La rilatoj kun aliaj fakaj asocioj daŭre pliboniĝis kaj kreskis.

### **3. Laborplano**

#### **3.1. Informa Servo**

La korespondado okazas pere de interreto, ni pli bone povus nomi ĝin informado, ĉar ĉiuj membroj povus korespondi samtempe kun ĉiuj aliaj membroj per IFEF-diskutadgrupo, pere de Fejsbuko ricevi kaj doni informojn, pere de la paĝo ifef.net la membroj kaj la eksteruloj povas ricevi ĉiujn informojn pri ĉio, kio estas enretigita, ĉefe pri fakaj novaĵoj. La faldfolio pri IFEF estas je dispono de l.a. por printi ĝin en la landa lingvo por reklami dum landaj kunvenoj. Dum la UK IFEF kunlaboris kun GEA kaj PEA kaj reklamis la komunan kongreson.

#### **3.2. Junularo**

Estas ĉiam valida la oferto gastigi junan fervojistan esperantiston dum la kongreso. Por la estraro tio estis bona iniciato por instigi junulojn partopreni kaj kunlabori dum kongreso. Ĉi jare neniu estis proponita aŭ sinproponis.

#### **3.3. Faka Komisiono**

##### **3.3.1 Terminara Sekcio**

Dum la jaro 2019 aperis Terminara Kuriero n.157 post longa paŭzo pro la malsano de Hoffmann. Nun Guido Brandenburg prenis al si la taskon daŭrigi la laboron kaj la kontaktojn kun *UIC*. Li partoprenis en Pollando, en urbo Gdansko (iama *Danzig*), fervojan ekspozicion "*TRAKO*", kie okazis la kunveno de la Terminologia Komisiono de *UIC*.

Estis reviziitaj multaj fakaj tekstoj por artikoloj kaj prelegoj.

##### **3.3.2 Fake Aplika Sekcio**

En 2019 aperis la "FervojFaka Kajero" n-ro 27. FervojFakaj Kajeroj kaj aliaj fakaj publikaĵoj estis enretigitaj en la paĝaro "ifef.net".

##### **3.4 Komisionoj kaj laborgrupoj**

El la komisionoj kaj laborgrupoj venis raportoj pri la agado.

La Pr-ino raportis pri siaj interrilatoj kun aliaj organizoj, dum diversaj aranĝoj kie ŝi estis invitita.

El la informada grupo, daŭre oni ĝisdatigas novaĵojn en la paĝoj de ifef.net kaj "Facebook" kaj donas informojn pere de nunaj telekomunikad-rimedoj.

#### **3.5. Fervojista kontaktkunveno dum la 104-a U.K. Lahtio - Finnlando (20-27/07/ 2019)**

Dum la UK en Lahtio okazis la kutima fervojista kontaktkunveno kiun



gvidis Liba GABALDA. Ankaŭ la LKK-representanto de la 72-a IFK ĉeestis, kaj informis pri la komuna kongreso de la tri asocioj. Sabate dum la Movada Foiro, ili prezentis IFEF per disdono de informiloj kaj de aliĝiloj. La budo staris apud tiu de la Germana Asocio, tiel ebligis komune reklami pri la Triopa kongreso.

## 4. Aranĝoj

### 4.1. IFEF-aranĝoj de LA

Laŭ la indikoj de la jarraportoj de L.A. multaj el ili aranĝis kunvenojn kun ĝenerala asembleo, kelkaj nur la ĝeneralan asembleon. La programo antaŭvidis ankaŭ prelegojn kaj ekskursojn. Kelkaj eksterlandaj IFEF-membroj vizitis tiujn aranĝojn.

### 4.2. IFEF-Kongreso

La 71-a IFK Malago (ES) okazis 3-an ĝis 9-an de Majo 2019. La kongreson partoprenis 180 esperantistoj el dudekkvar landoj (aliĝis 83 al IFEF kaj 97 al HEF). Ĉeestis gastoj el Aŭstrio – Belgio – Brazilo - Bulgario – Ĉeĥio – Ĉinio – Kubo - Danio - Francio – Germanio - Hispanio - Hungario – Italio – Japanio - Kroatio - Meksiko - Nederlando - Nord-Irlando (UK – Unuiĝinta Reĝlando) - Pollando - Portugalio - Rumanio - Rusio - Serbio - Svedio - Suda Koreio. Dum la inaŭguro ĉeestis reprezentantoj de UEA kaj la landa E-asocio, reprezentantoj de la fervojo kaj de la urbo. Detalaj raportoj kaj simplaj impresoj alvenis de diversaj partoprenantoj.

La temoj de la kongreso estis bone pritraktataj.

La ĉefa prelego temis pri: HYPERLOOP, (hispana grandrapida trajno) la morgaŭa fervojo. Multaj prelegetoj venis de aliaj partoprenantoj kiuj prezentis novaĵojn el sia lando. Pro la 110-a jariĝo de IFEF, Jan Niemann (Danio) prezentis mallongan historion de la Fervojista Internacia Movado.

Rimarkinda estis la faka ekskurso al fervojlinio en *Zafarraya*, kie oni ĝuis veturon en trajneto tirata per eta vaporlokomotivo, por la fervojistoj kaj la amikoj de fervojo ĝi estis ege interesa. Artikoloj pri la kongreso aperis en pluraj esperantaj gazetoj kaj lokaj ĵurnaloj. La ekskursoj malkovrigis por ni ne konatajn lokojn, ĉu historiaj ĉu naturaj.

## 5. Eksteraj rilatoj

### 5.1. UEA

La kontaktoj kaj kunlaboroj inter UEA kaj IFEF daŭre estas bonaj. La Prino ĉi jare ne partoprenis la UK-on sed kiel K-ano "A" ĉe UEA ŝi

partoprenis la retajn diskutojn kaj voĉdonojn. Dum la Movada Foiro kaj dum la Fervojista Kontaktkunveno nia reprezentantino prezentis la venontan kongreson kaj reklamis pri IFEF.

## 5.2. FISAIC

La kongreso en Malago okazis sub la patroneco de FISAIC, la informo aperis en la FISAIC-kalendaro.

Ne venis reprezentanto de FISAIC, kvankam Niemann neoficiale reprezentis ĝin, sed la Prezidanto Philippe Rouche sendis gratulan leteron legatan dum la Plenkunsido.

### Fina komentario

La ĝenerala situacio de IFEF estas preskaŭ stabila. La membronombro estas iom pli malalta, dum la jaro ni perdis landan asocion, Japanio. Inter la fakaj asocioj de UEA, IFEF estas unu el la plej grandaj.

La rilatoj kun aliaj esperantaj asocioj estas bonaj. Ni klopodas okazigi renkontiĝojn kunlabore kun aliaj Esperanto-organizoj, por pligrandigi la efikon.

### Bolonjo, 01-a de Marto 2020.

#### Vito Tornillo, la IFEF-Sekretario

---

### Antaŭ, dum kaj post pandemio de *Covid-19*

Antaŭ 5 monatoj neniu estus pensinta tion! La lasta tiaspeca grava evento okazis antaŭ 100 jaroj... Ni alfrontas nuntempe tutmondan minacon, kiu ŝanĝis abrupte kaj draste nian vivon. Neniu, ie ajn en la mondo, estis vere preta taksu la amplekson kaj rapidecon per kiu disvastiĝas tiu epidemio ege malfacile kontrolebla.

Plej multaj registaroj ne prenis la avertojn seriozaj, kvankam la nova viruso estas konata ekde Decembro 2019. Komence de Januaro oni sciis ĝuste pri kio temas la viruso, meze de Januaro oni sciis, ke ĝi transdoniĝas de persono al persono, kaj fine de Januaro estis identigitaj kazoj en multaj lokoj tra la mondo. Tamen daŭris semajnojn ĝis kiam la unuaj seriozaj dispozicioj estis faritaj sur skalo sufiĉe granda por efiki kontraŭ pli larĝa disvastiĝo de la viruso .

Finfine la aŭtoritatoj komprenis, ke la ĉefa solvo estas socia distancigo kaj specialaj higienaj aranĝoj kaj aplikis severajn rimedojn: fermo de oficejoj, lernejoj, restoracioj, hoteloj, butikoj, teatroj, koncertejoj, sportaj eventoj, parto de la publikaj transportaj sistemoj, ktp. La esencaj

servoj kiel nutraĵoj, medicinaj servoj kaj polico daŭre funkcias kaj multaj aferoj okazas interrete hejme: ekz. la instruado.

La konsekvencoj de ĉi tiu drasta ŝanĝo de la normala vivo estas multnombraj: sociaj, ekonomiaj kaj sanecaj.

### **La medicinaj konsekvencoj**

Malgraŭ la eksterordinaraj klopodoj de la esploristoj, bedaŭrinde ankoraŭ ne ekzistas specifa terapio kontraŭ tiu malsano. Spite al la drastaj limigoj adoptitaj, ne estas klaraj signoj pri ebla malrapidiĝo de la tutmonda pandemia evoluo. Kontraŭe, la nombro de la homoj infektitaj de koronaviruso kaj ankaŭ la nombro de pro ĝi mortintoj kreskas ĉiutage kun granda rapideco.

Ĝis nun estis anoncitaj pli ol 3,5 milionoj (6.5.2020) da kazoj de infektiĝo tutmonde, kaj pli ol 250 000 perdis sian batalon kontraŭ la murdema viruso. Estas teruraj ciferoj, kiuj pravigas la senprecedencajn mezurojn de la aŭtoritatoj.

La fakuloj substrekas, ke la viruso ne malaperos mirakle kaj ke ni devos lerni vivi kun ĝi longtempe, pli precize ĝis kiam aperos vakcino en sufiĉa kvanto kiu ebligos grandskalan imunigon. Tio ne povas okazi pli frue ol post unu jaro. Tiurilate, intensaj interŝanĝoj estas faritaj inter esploristoj el la tuta mondo por trovi solvojn kaj oni elprovas plurajn receptojn.

Ĝis tiam oni atendas, ke la memizolado kaj kvaranteno havu pozitivajn konsekvencojn por la loĝantaro, reduktante signife la malsaniĝon. Ni nur devas respekti la konsilojn de la kuracistoj koncerne la individuan drastan higienon kaj tiel preventi kolapson de la sanitara sistemo.

Kiom da estos finfine la homaj perdoj ni ekscios nur pli poste el la oficialaj statistikoj, kiuj estas pli-malpli precizaj.

### **La psikaj konsekvencoj**

Ĉi tiu pandemio ŝanĝis entute nian ĉiutagan vivmanieron. Multaj el ni, eĉ tiuj, kiuj ne estis infektitaj de tiu viruso, restas izolitaj en hejmoj tiom longe kiom necesas por malebligi la disvastiĝon de la infekto. Kvankam ŝajnas trafa ideo, kiu komence estis bone perceptita kiel ia paŭzo de la kutimaj ĉiutagaj agoj, aŭ kiel bonvena ferio, ni devas agnoski ke tiel longa periodo en izolo povas lasi spurojn en nia psiko. Post iom da tempo tiu izoliĝo, la manko de subĉielaj promenoj kaj malapero de oftaj kontaktoj kun familianoj, amikoj aŭ kunlaborantoj povus alporti tristecon, eĉ deprimiĝon.

La malfacilaĵo venas ĝuste el tio, ke la homo estas socia estaĵo, kiu bezonas, iniciatas kaj subtenas sociajn kontaktojn kun siaj samuloj. Ni estas konstruitaj por vivi kaj labori en grupoj. Longdaŭra izoligo akcentas la senton de soleco, la panikon, kiuj iĝas ege streĉigaj faktoroj.

Paradokse, la homoj devas resti izolitaj por konservi sian sanon, sed plilongigita izolado povas havi negativajn efikojn sur ilian sanon.

Ĉar la emocia stato draste povas influi negative la fizikan sanon, kaj ĝuste por eviti tion, la psikologoj konsilas al ni transformi ĉi tiun ege malfacilan periodon en periodon plenplenan de ŝancoj kaj tiel pli bone regi niajn emociojn.

Jes, malfacilas vekiĝi kun rideto sur niaj lipoj ĉi tiujn tagojn markitajn per negativaj novaĵoj, sed ni povus lerni kiel aprezi ĉefe la bonajn aferojn kiuj ĉirkaŭas nin.

Jen kelkaj simplaj konsiloj:

- ni faru tiujn aferojn pri kiuj ni plendis ĝis nun, ke ni ne havas sufiĉe da tempo aŭ emo por fari,

- ni remalkovru malnovajn hobiajn kiuj malstreĉigas nin,

- ni evitu la senĉesan spektadon de la televidelsendoj aŭ diversaj retpaĝoj cele esti ĝisdate informitaj pri la plej aktualaj novaĵoj koncerne la epidemion; evitu ĉiajn manipuladojn kaj falsajn informojn pri ĝi. Ĉiuj ĉi negativaj informoj "fosiĝas" en nian menson kaj povas lasi nin sen energio, sen kapablo vidi precipe la bonan flankon de la aferoj.

- ni konsciiĝu ke "fizika distanco ne signifas emocian distancon"! Per regulaj kontaktoj kun homoj, kun amikoj kaj familianoj, konservante senton de komunumo, ni povas sperti la pozitivajn efikojn de la komunikado per ĉiuj rimedoj kiujn la teknologio metas je nia dispono, -kaj, ĉefe, ni pensu, ke tio estas pasanta etapo kaj ke baldaŭ ni rekomencos nian normalan vivon.

### **La soci-ekonomiaj konsekvencoj**

La ekonomia krizo provokita de koronaviruso estas preskaŭ tiel granda danĝero kiel la pandemio mem. Eĉ pli granda, laŭ iuj fakuloj.

Jam estas multnombraj maldungitoj, oni laboras hejme por pli malgranda salajro, multaj entreprenoj estis fermitaj, aliaj bankrotis kaj en kelkaj, kiuj pluvivas, la produktado lamas. Amasaj manifestacioj jam komenciĝis diversloke kontraŭ manko de financaj rimedoj kaj la nekapablo aliri rimedojn pro senlaboreco en diversaj formoj.

Sed ni povas, kaj estus konsilinde, turni nian atenton ankaŭ al pozitiva influo de ĉi tiu krizo.

La organizado de la laboro povas ŝanĝiĝi, ĉar laboro hejme povas esti same efika, kun malpli altaj kostoj – kaj tio povas signifi kreskon de produktada efikeco en diversaj sektoroj, ekz. informteknologio.

La krizo povas stimuli novigon kaj uzon de novaj teknologioj en tiuj aspektoj de la vivo, kiujn ni kutimis fari alie, aŭ rekonsciĝi pri la socia graveco de iuj okupoj.

En instruado, la distanca instruado trejnigis instruistojn kaj lernantojn uzi teknologiojn, interretajn interagajn aplikojn. En la estonteco iuj trejnaj kunsidoj eble fariĝos regulaj.

En la sano-kampo oni atendas post ĉi tiu krizo ke multaj landoj revenu al pli atenta prizorgado de la sansistemo, per konsiderindaj investoj tiel en materialaj kiel en homaj rimedoj.

### **Konklude**

Oni supozas, ke la viruso estos ĉe ni dum longa tempo, ĉar novaj ondoj de la epidemio povus aperi kaj daŭros almenaŭ unu jaron ĝis ni ricevos vakcinon. La vivo ne revenos tiel rapide al normaleco kiel ni ĉiuj deziras. Malstreĉiĝo nur povas okazi iom post iom kaj estas nature, ke la restriktioj por plimildigi la situacion daŭru plurajn monatojn per zorgema planado de tia laŭgrada krizeliro.

Samtempe, la homaro neniam estis pli solidara ol nuntempe kaj decidema venki tian teruran defion.

La spertoj kiujn provokis koronaviruso restos en la kolektiva menso dum longa tempo, kaj estas interese kion la socio, ekonomio, scienco kaj ni mem lernos el ĉi tiu pandemio!

La medicina sistemo ricevos eble la plej gravan renovigon kaj la investoj por iĝi kapabla regi tian sanecan krizon probable pliiĝos.

Povus esti ke la socia solidareco reakordiĝos, la graveco de la aliulo estos alie pritaksata, la skalo de valoroj ŝanĝiĝos, la familio estos pli alte aprezata kaj la bezono de kunordigita kolektiva agado ankaŭ estos revalorigata.

Se temas pri ni, esperantistoj, kion ni lernos en ĉi tiuj momentoj krom niaj fundamentaj valoroj: solidareco, kunlaboro, amikeco, reciproka akcepto?

Por adaptiĝi al „nova normaleco” en la sekvontaj jaroj gravas starti

diskutojn pri pluraj aspektoj, ĉefe pri modernigo de nia laboro: kiel konservi kontaktojn dum epidemio per la multnombraj rimedoj disponeblaj dank' al interreta teknologio, ekscii ĉu eblas organizi kongresojn aŭ plene virtualajn renkontiĝojn kaj kiel la nunaj spertoj influos niajn estontajn kunvenojn.

Do ni rigardu kun multe da espero kaj fido al la proksima estonteco en kiu tio, kion ni ĉiuj travivas hodiaŭ, povus resti nur paĝo de doloriga historio, kiu por ĉiam ŝanĝos nian pens- kaj agmanieron kaj el kiu ni povas multon lerni.

Intertempe ni restu respondecaj, pozitivaj kaj solidaraj!

Tio povas esti la moralo de ĉi tiu monda tragedio!

**Psik. Rodica TODOR**

## **Kiamaniere eŭropaj fervojoj reagis al koronaviruso**

Dum eŭropaj flugkompanioj nuligas siajn flugkonektojn al Italio kaj aliaj landoj, fervojaj ekspluatantoj klopodas daŭrigi trafikon laŭeble kiel normale. Tamen, internacia trajntrafiko al kaj el Italio estis haltigita. En la sama tempo eŭropaj fervojekspluatantoj akceptis iomete aliajn kriteriojn por oferti sekurajn vojaĝojn al siaj klientoj.

La atentemo de tuta Eŭropo direktiĝas al Italio. Pli kaj pli infektokazoj pro koronaviruso venas de tiu ĉi lando. Hodiaŭ (1-an de Aprilo) estas en Italio pli ol 12 400 infektitaj homoj, pli ol 800 el ili mortis. Ĝi estas la plej alta nombro en Eŭropo kaj dua plej alta en la mondo post Ĉinio, kie la infekto komenciĝis. Tia statistiko devigas najbarajn landojn limigi transportkonektojn al/el tiu lando.

Komence de la semajno, kelkaj gravaj flugkompanioj nuligis aŭ deklaris intencon nuligi flugojn al/el Italio en venonta semajno. Fervojekspluatantoj estas ankaŭ devigitaj reagi simile pro la viruso.

### **Zorgoj pri dungitoj**

Komence de Februaro trajnkompanioj enkondukis por siaj dungitoj restriktajn en translimajn trajnojn al Italio. Franca kompanio *SNCF* kaj aŭstria ekspluatanto *ÖBB* reprenis siajn konduktorojn antaŭ la itala



*DB-konduktoro montras kiamaniere lavi manojn, fonto: Deutsche Bahn*

landlimo. Sur sekvanta parto de trajnveturo ili estis anstataŭigitaj per itala personaro. Tamen, la kreskanta nombro de infektitaj homoj en Italio devigis fervojkompaniojn enkonduki aliajn disponojn (vidu malsupre). Krom tio, kelkaj ekspluatantoj decidis plifortigi imunecon de sia personaro. Ĉeĥa Fervojo liveris por sia personaro vitaminojn.

## Nuligo de trajnoj

Plua paŝo estas nuligo de trajntrafiko. *Trenitalia* kiel la plej grava ekspluatanto en Italio komencis redukti trajntrafikon en la lando jam en Februaro. Ili rekomendis al vojaĝantoj sekvi informojn pri trajnonuligo en retpaĝaro kaj en stacioj. Samtempe fervojkompanioj de najbaraj ŝtatoj komencis limigi siajn trajnkonektojn al Italio por iu periodo kaj estis trudataj plilongigi malpermesojn.

Komence la aŭstra nacia fervojkompanio *ÖBB* suspendis siajn noktajn trajnojn al Italio. Sekve ili nuligis ankaŭ dumtagajn konektojn. Ĉi tiu semajno estis decida por internaciaj trajnoj al/el

Italio. Mardon la 10-an de Marto svisa kompanio *SBB* kaj itala kontraŭflanka *Thello*, filia kompanio de *Trenitalia*, haltigis siajn translimajn aktivadojn. Merkredon la 11-an de Marto, *Trenitalia* nuligis siajn trajnojn el *Trieste* al *Ljubljana*, al ĉefurbo de najbara Slovenio. *Deutsche Bahn* ankaŭ suspendis siajn trajnojn al Italio.

Transportkompanioj deklaris, ke trajnkonektoj estos limigitaj kelkajn semajnojn, almenaŭ ĝis komenco de Aprilo. Pluaj restriktioj aŭ rekomendo de trafiko dependos je disvastigo de viruso. Estas konsiderinde, ke vartrajnoj plu veturas inter Italio kaj najbaraj landoj.



Germana informafiŝo, fonto *Deutsche Bahn*



Dungito de ZSSK purigas trajnon, fonto: ZSSK

## Informado de vojaĝantoj

Apud trafikrestriktoj transportaj kompanioj iras ankaŭ aliajn vojojn. Ili rekomendas al siaj vojaĝantoj esti pli singardemaj dum vojaĝo en trajno kaj eviti vojaĝojn dum malsano. Krom tio, kompanioj instalas en trajnoj kaj en stacioj informtabulojn por vojaĝantoj cele informi ilin pri simptomoj de infektiĝo, alvokas pasaĝerojn eviti manpremon, porti vizaĝvualeton, uzi desinfektaĵojn kaj sapojn, ktp. Laŭ *Deutsche Bahn (DB)* kreskis konsumado de sapo kaj desinfektaĵo en trajnoj je 20 procentoj. Germana kompanio anticipas, ke tiu nombro daŭre kreskos. Pro tio ĝi ofertas pli kaj pli da rimedoj. Aliaj faras same.

## Monitorado de pasaĝeroj

Pollando enkondukis kontrolon de temperaturo ĉe pasaĝeroj en internaciaj trajnoj. La mezurado komenciĝis ĉi-semajne. Dungitoj de *PKP Intercity* komune kun Fervoja sekureca gvardio mezuras temperaturon de envenantaj vojaĝantoj en internaciaj trajnoj kaj kolektas iliajn personajn informojn. Fine la kompanio alvokas la klientojn plenigi specialan „Formularon de pasaĝero”. La formularo estis kreita en landa Ministerio por sanaferoj kun celo ricevi pli da informoj kiam infektitaj homoj estas identigitaj dum aŭ post vojaĝo. La formularojn estas eble ricevi en fervojstacioj kaj en trajnoj aŭ estas eble elŝuti ĝin el retpaĝaro.

## Desinfektado de trajnoj



Desinfektado de trajno per ozono en Slovakio,  
fonto: ZSSK

Alia decido estas desinfektado de trajnoj. Koncerne al koronaviruso devis fervojaj ekspluatantaj kompanioj plifortigi kaj intensigi ĝin. *Deutsche Bahn* laŭŝtupe mallongigis tempointervalojn inter purigado de siaj longdistancaj trajnoj de kvar horoj al du horoj. Tial *DB* devas dungi novajn laborantojn en

venontaj semajnoj. *České dráhy* ankaŭ intensivigis trajnpurigadon. En ĉi tiu semajno la ĉeĥa kompanio komencis ozonan desinfektadon de trajnoj, kiuj forveturas al Aŭstrio el vagonejo en *České Budějovice*. La slovakia nacia ekspluatanto *ZSSK* praktikas ankaŭ ozonan desinfektadon en siaj longdistancaj trajnoj. Ili komencis purigi ĉi tiun tipon de trajnoj



trifoje dum tago. *Arriva vlaky*, ĉeĥa filia kompanio de *Arriva Group* kiu respondecas pri trajntrafiko en Ĉeĥio kaj Slovakio ankaŭ intensigis purigadon de siaj trajnoj. Pro tio, ili avertas vojaĝantojn pri ebla malfruiĝo.

**Ladislav Kovář**, tradukita el RailTech.com, Week 14, 1.4.2020

## Romantiko de etŝpura fervoja linio en montaro

Tre proksime de germana – ĉeĥa – pola landlimoj situas la plej malgranda germana montaro *Zittauer Gebirge* (*Zittau*-montaro). La regiono estas nomata *Naturpark Zittauer Gebirge* (Naturparko *Zittau*-montaro) kaj ĝi estas konata precipe pro siaj sabloŝtonaj rokformacioj kaj vilaĝetoj kaj urbetoj, aspektantaj kvazaŭ kiel en fabelo. Fabele aspektas ankaŭ vaporaj etŝpuraj trajnoj, kunligantaj tiun ĉi mondfinon kun grava fervojnodo *Zittau*, distrikta urbo kaj centro de ĉi tiea regiono.

Ni provu viziti tiun ĉi regionon veturante el direkto de Ĉeĥio. Plej rapide eblas veturi trajne el *Liberec* (IFEF kongresa urbo en 2011), aŭ el *Varnsdorf*. Fervojan trafikon sur tiu ĉi linio prizorgas la germana kompanio *Die Länderbahn GmbH* en siaj trajnoj,

nomataj *Trilex*. En la trajnoj kompreneble validas ĝia propra tarifo kiel en eŭroj, tiel en ĉeĥaj kronoj, ekskursantoj povas aĉeti favorprezan tagan retbileton *Euro – Nisa – Ticket* por unu ĝis kvin vojaĝantoj.

Tiun ĉi favorprezon elektas ankaŭ nia grupeto kaj tuj



Motorvagono *Trilex* en stacio *Liberec*

Aŭtoro: ŠJŮ, Wikimedia Commons, CC BY-SA 3.0,

post alveturo al *Liberec* ni en *ČD centrum* en ĉefa stacia halo aĉetas bileton por kvin personoj kaj foriras tra longa subirejo al kvina perono, de kie forveturas trajnoj *Trilex* en direkto al Germanio. Post nelonge venas *Desiro*-motorvagono, kaj kiam ni vidas aron da homoj pretaj por enrajniĝi, ni plirapidas. Tio estis antaŭvidebla, ĉar dum unu minuto trajno fariĝas plenokupita, kaj kiu ne rapidis, staras...

## **Kun ĉeĥa priservo**

La trajnoj trafikas en ĉirkaŭ unuhora intervalo, aŭ en transportinterligoj markitaj *TL*, trafikantaj inter *Liberec*, *Hrádek nad Nisou*, *Zittau*, *Varnsdorf* kaj *Seifhennersdorf*, aŭ en "rapidtrajnaj" itineroj *TLX*, kiuj el *Zittau* direktas sin rekte al Dresdeno. Somere la kapacito de duvagona kombinaĵo en iuj trajnoj ofte estas nesufiĉa.

Nia trajno tuj poste ekveturas kaj agrablan surprizon prezentas ĉeĥa personaro, kiu en regionaj trajnoj akompanas dum la veturado. Esceptaj estas rapidtrajnoj al Dresdeno, en kiuj en *Zittau* anstataŭas ilin germanaj kolegoj.

Post dudek minutoj ni venas en landliman stacion *Hrádek nad Nisou*, de kie la trajno iom kurioze daŭrigas sur ĉirkaŭ kvinkilometra sekcio sur pola teritorio, kompreneble sen iu ajn halto ĝis *Zittau*, kiu male situas tuj malantaŭ pola-germana landlimo.

Veturo sur pola teritorio estas travivaĵo per si mem, ĉar trajnoj ĉi tie trafikis maksimume per tridekkilometra rapideco, sed pli frue okazadis trafikado eĉ malpli rapide. Sen speciala klarigo vidiĝas, kian sintenon poloj havas al tiu ĉi trapenetra apudlandlima sekcio... Sed ni jam estas kun eta malfruiĝo en stacio *Zittau* kun stacidomo rekonstruita en retrostilo, kaj vikle piediras al antaŭstacio, kie povus atendi nin nia vaportrajno. Kvankam estas jam kvin minutoj post ties laŭhorara forveturo, (sed tamen nur...) germana solidareco kaj ĝentileco pruviĝas, jam de malproksime la trajnpersonalo mansvingas, ke oni scias pri ni, do la pluveturado estas savita. La plia transportliga trajno ja trafikis nur post du horoj.

## **Romantika etŝpura linio**

Nia vaportrajno tuj post nia eniro ekveturas kaj ĝi digne traveturas interplektaĵon da trakoj en la stacio *Zittau* kun normala ŝpuro 1435 mm, kaj post kvin minutoj ni venas en haltejon *Zittau Hp*, de kie ni per relative abrupta descendo daŭrigas tra iomete grandradiusa kurbiĝo en direkto al sudaj antaŭurboj de *Zittau*. Bonvenas refreŝiĝo, kiun simpatia stevardo komencas porti en la trajno en formo de biero kaj limonadoj, kiu fine vidigas sin kiel ĉeĥa sampatrujano, ni do restantan mendon kaj pagadon solvas nur en la ĉeĥa. La vetero favoras nin kaj ni admiras ordigitajn ĝardenetojn kaj dometojn, kaj post dudek minutoj ni venas en preterpasejon *Zittau Vorstadt*, kie ni reatingas laŭhoraran tempon kaj

plutrafikas sur modera ascendo tra herbejoj kaj arbaretoj trans *Obersdorf* al fervojnodo *Berstdorf*, kiu estas por ĉiu fervojamanto vera Edeno. El *Berstdorf*, kie unue oni devige fotas vaportrajnojn direktantajn kiel al *Jonsdorf*, tiel al *Oybin*. Nia trajno post mallonga restado forveturas kaj kun laŭta spirbruo ascendas al *Niederdorf*, de kiu ĝi allige laŭlonge de rivereto *Goldbach* kaj ĉirkaŭ la Diabla muelejo (*Teufelsmühle*) post dek minutoj venas al celstacio *Kurort Oybin*. Saksa-supraluzacia fervoja kompanio kun garantio limigita (*SOEG*), kiu vaportrajnojn ekspluatatas, agnoskas malplikostajn veturbiletojn *Euro-Nisa-Ticket*, sed ĉiu plenaĝa vojaĝanto devas alpagi 5 eŭrojn. Tiu ĉi bonŝance validas por veturo tien-reen. Tamen estas bone kunporti monon, kaj tiun ĉi fakton ne forgesi. Trajnakompanantoj estas afablaj, tamen strikte postulas ĉion, kio estas bezonata.

### Unika stacio en *Oybin*

Post alveno al *Oybin* ni unue ĉirkaŭrigardas la stacion, kiu indas tion. Kiu havas etajn infanojn, povas viziti trafikan amuzan ludejon kun skulptitaj



En stacio *Kurort Oybin*, WikiMedia

skizoj de staciaj konstruaĵoj, vagonoj kaj lokomotivoj tuj en proksimeco de la kajo. Tiu efektiva monumenta stacidoma konstruaĵo devenas de la jaro 1890 kaj en la vestiblo sin kaŝas ligna miniatura preĝejo, kaj belstila kafejo. En somero oni ordinare sidas ekstere sur la teraso kun elvido al monto *Oybin*, la internaĵo estas prefere uzata aŭtune aŭ vintre, tamen

en somero ĉi tie estas agrabla malvarmo. Eble konvenos ankaŭ unu praktika sperto. Kiu bezonos viziti necesejon kun tualetejo, uzu tiun mempriservan rekte en stacidoma halo, eniro kostas 50 cendojn. Ĉie alie en la urbo tio estas aŭ pli kosta, aŭ strikte limigita, kaj en unu kafejo mi eĉ ekvidis anoncon, ke se en necesejo estos trafrovita iu, kiu ne estas gasto de la kafejo, devas pagi punpagon dek eŭrojn, eble eĉ pli. La kafejestroj kaj gastejestroj verŝajne havas malbonajn spertojn kun turistoj...

Sed ni restu ankoraŭ en la stacio, kie interesis nin du ordinaraj, tamen



Loĝvagono

<https://www.dampfbahn-route.de>

jam eksteruzaj pasaĝer-vagonoj kun brakseĝetoj antaŭ enirpordoj. Temas pri nenio alia ol loĝvagonoj, kiuj ekde aprilo ĝis oktobro ofertas netradicie pasigitan libertempon rekte en fervojstacio. Ni pride-mandas ĉi tie sidantajn feriantojn, kaj ni ekscias,

ke ĉiu vagono de veturilaro, nomata "Apud akvokolektejo", havas je dispono du litojn, kuirejon kun tradicie bonkvalita germana aranĝaĵo, kie mankas nek mikroonda kuirilo, glaciŝranko kaj elektra kuirilo, nek banejo kun necesejo kaj duŝilo. Komforta servo - kaj tio laŭvorte kelkajn metrojn de la trajno!

### En duetaĝa aŭtobuso aŭ piedire

*Kurort Oybin* mem tamen indas viziton. Ni prove promenu en la ĉefa strato, portanta germanan nomon *Hauptstrasse*, kie estas vico de magazenetoj kun memoraĵoj kaj refreŝigaĵo. Ni konsilas germanan specialaĵon „*Currywurst*”, vi nur ne petu mustardon, sed prefere keĉupon, alie vi vekos, kiel ni, mirigitajn rigardojn de priservanto. Sed la homo ne povas scii ĉion. Survoje de negranda ascendo ni alvenas al *Haus des Gastes* aŭ „Domo de gasto”, kie en teretaĝo situas bone provizita informcentro kun multaj prospektoj kaj informmaterialoj. Kaj kiu ne estas laca, povas iri plu sur ŝtuparo kaj proporcie kruta vojo al

*Oybin*-burgo kun belega elvidejo sur suda kaj norda terasoj. Aliaj ne devas malĝoji, ĉar ĝuste por ĉi tiuj turistoj trafikas ekde stacio en *Oybin* specialaj aŭtobusoj en regulaj intervaloj al *Oybin*-burgo. La pli postulemaj povas aldone pasigi en duetaĝa speciala aŭtobuso instruan ĉirkaŭveturon tra *Zittau*-montaro. En sezono aŭtobuso trafikas kvinfoje en la tago kaj la tuta rondveturo daŭras ĉirkaŭ unu horon kaj duonon. Do kvankam vi estos proksime de landlimo, en la germana *Zittauer Gebirge* vi sentos vin kiel en fabelo.

**Jindřich Tomášek**, tradukita el gazeto *Železničář* 23/2019

---

### **Karen K. Olsen, 29.11.1929–26.03.2020**

Longan, bonan kaj enhavoriĉan vivon Karen havis. Ŝi venis de la insulo *Fyn*, sed kiel junulino ŝi transloĝiĝis al Kopenhago, kie ŝi kelkajn jarojn laboris ĉe *DSB* en la administraciaj oficejoj de la tiama ĉefsidejo *Sølvgade* 40. Kiam ŝi renkontiĝis kun Henning kaj edziniĝis al li, ili kune decidis, ke ŝi ne laboru eksterdome. Ŝi majstris la hejmon kaj prizorgis grandan ĝardenon, kie ili loĝis ... i.a. sur la insulo *Samsø* kaj poste multajn jarojn en *Næstved*. Henning apartenis al la generacio de fervojistoj, kiuj transloĝiĝis pro la laboro. La du infanoj ankoraŭ nun kun ĝojo rememoras pri la infaneco, ke Karen estis hejme ĉe ili. Henning faris organizan 'karieron' en IFEF, kaj dum multaj jaroj ili kune vojaĝis al kongresoj, estrarkunvenoj ktp. Karen estis 's-ino Olsen', sed ankaŭ ŝi mem kun granda scio kaj obstina volo!



Ekskurso Julio 2017 - Karen kun DEFA-amikoj

'Hejme' en la Kopenhaga DEFA-klubo Karen estis la praktika miraklulino, kiu povis organizi bonajn klubvesperojn, gajajn festojn kaj belajn ekskursojn. Ŝi estis *'master chef'* en la kuirejo, - tion memoras certe kelkaj el vi, kiuj tion-ĉi legas. Ni dankas pro ĉiuj belaj memoroj pri klubaj vesperoj, vojaĝoj, kunestadoj.

**Jan kaj Lene, DEFA**

---

### **Fritz Lautenbach, 05.03.1925-12.02.2020**

Meze de Februaro atingis nin la informo ke forlasis nin plia konatulo, plia aktivulo, kiu decide helpis rekonstrui la fervojistan Esperanto-asocion en Germanio. Fritz Lautenbach naskiĝis en 1925 kaj estis samtempulo de mia patro. Komuna al ili estis la spertoj en la Miljara Regno kaj la personaj konkludoj post la milito. Ilin ligis multjara amika interrilato kaj kunlaboro en la esperantistaj fervojistaj organizaĵoj – se oni legas raportojn, protokolojn kaj korespondaĵojn ĉiam denove aperis lia nomo. Tiutempe mi mem interesigis pri profesiaj aferoj kaj familio pli ol pri Esperanto. Hodiaŭ mi tion bedaŭras, ĉefe ĉar mankas al mi kvazaŭ parto de la esperantista biografio, kiun koni fakte gravus se oni volas priskribi la rolon de la hodiaŭaj geamikoj retrospekte.

Fritz estis redaktoro de la GEFA-bulteno Fervoja Esperantisto ĝis 2013, kiam mi transprenis tiun taskon. Mi siatempe vizitis lin en lia domo en Fulda por vidi, kion eblis heredi de li. Kaj mi pasigis tre agrablan tagon fosante tra kartonkestoj, ellogante informojn el la arkaika komputilo, vizitante la kantonon de la financoficejo kaj promenante komune kun Ria tra pitoreskaj stratetoj kaj riĉe ornamitaj salonoj de la urba kastelo. Ria ne nur estis akompananto kaj vigliganto de Fritz sed ankaŭ sperta ĉiĉerono pri sia urbo.

De Fritz mi ricevis tre koncizan kronologian tabelon de liaj aktivecoj. La unua alineo indikas la esperantistiĝon en 1951 en kurso ofertata de la fervoja faklernejo Fulda. Sian unuan IFEF-kongreson li ankoraŭ menciis, tiun en Lindau en 1952. La sekvintajn li nur sumigis per „kaj multaj pliaj“, same li procedis rilate la GEFA-renkontiĝojn.

En la alineo „1967“ troviĝas membreco en la LKK de la 19-a IFEF-kongreso en Fulda, ne pli. Konsiderante ke temas pri aranĝo kun 470 partoprenantoj el 20 landoj, abunda faka kaj distra programo, lingvaj ekzamenoj, ekspozicio, stratbapto kaj pli ol 160 gazetartikoloj, mi



supozas ke Fritz ankaŭ tie faris meritoplenan laboron.

„1974” - mi daŭrigas citadon – Fritz estis nomumata ekzamena komisiito de Germana Esperanto-Instituto kaj gvidis la ekzamenan komisionon de GEFA. Iu aŭ alia certe memoras lin kiel ekzamenanto.

En instruadon li plue kaj plie investis energion. En la jaroj 1983 kaj 1984 li kompilis kaj adaptis la memlernan kurson de GEFA. Dissendante kaj konsilante Fritz zorgis por vendo kaj apliko de tiu verko de 1984 ĝis 2013. 425 interesitojn li sukcesis proksimigi al la lingvo. Tion atestas lia statistiko.

En la jaro 2001 Fritz sekvis al Dieter Hartig kiel redaktoro de FE, tion kiel jam dirite ĝis 2013. Jen – modesta kia li estis - la lasta indiko en lia tabelo.



Fritz kaj Ria 2014 dum GEFA-jarkunveno ekskursantaj al Detmold

Mi persone vidis lin nur kiel unu duonon de la paro Ria kaj Fritz - Fritz havanta siajn kutimojn kaj opinion, Ria kiu lasis lin fari sed estis la entreprenema impulsdonantino – paro kiun mi observis kun admiro kaj iomete da envio.

Post la lasta komuna GEFA-jarkunveno pasis kelkaj jaroj. Ni vidis nin sporade. Restis la estrarkunsidoj ĉe Karin en Fulda kaj restis la imago, ke ŝanĝiĝas nek ni nek la aliaj. Sed la morto de Fritz Lautenbach memorigas nin, ke tempo estas limigita donaco. Komence de Marto li estus fariĝinta 95-jara.

**Guido Brandenburg**

### Zdenka Vacková, 24.04.1949-13.04.2020

Sinjorino Vacková estis multjara membro de ĈeFEA, kiu per sia amikeca kaj gaja karaktero pliriĉigis asociajn aranĝojn. Restu en niaj rememoroj.


### Aktualaĵoj

**Videokonferencoj de IFEF-estraro** - Limigo de personaj kontaktoj en nuntempa situacio trafis ĉiujn sferojn de homa agado ankaŭ tiujn de IFEF. La 3-an de Aprilo okazis la unua videokonferenco de la estraro kun gastoj. De tiam okazas pliaj kunvenoj en Interreto.

**Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia tago de multflankismo, 24.4.2020** – la mesaĝo estis sendita al Unuiĝintaj Nacioj por subteni multflankan agadon de UN. Kompletan tekston bonvolu legi en la UEA-paĝaro : <https://uea.org/gk/867>

Ladislav Kovář

### Amuza anguleto



**Direkto al centro:** produkto de kokino (3), senviva (5), frukto (4), parto de valbaraĵo (4), ejo (4); ŝteli (4), vestaĵo (4), rela vojo (5), kemia signo de nikelo (2)

**Direkto de centro:** virina sekso (3), folio por ludi (5), fari truon (4), arkitekta stilo (6), varbi (4), konstruaĵo (4), ano de familio (5), malstatiko (4)

Preparis Ivan Potiška